


AMO 78 – unuafoje Kroatio aktivas por AMO

Kroatio ne nur debutis per ĉi tiu seminario, sed depost tiam ege aktivas. La diverseco de la kontribuantoj atestas la bonajn ligojn kun la tuta movado, kiun oni el tiu lando havas. La sekva ekrankapto montras la gvidinton Marija Belošević, kiu iom poste eniris la novan aktivan komisionon de UEA pri AMO.



En 2022 okazos jam du pliaj seminarioj de AMO.

En la 26a de februaro okazos seminario pri internacia amikeco el sociologia vidpunkto – memore al la 53-jaraĝa programo de UEA por la Semajno de Internacia Amikeco (SIA).

Ene de la periodo novembro 11-14 okazos seminario kun la temo 'Vortara Farado'.

Jam en la atendovico el Kroatio estas du pliaj temo-proponoj, kune kun potencialaj partneroj, kiuj kredeble transiros al 2023.